1987 decembro
80a jaro
n-ro 984 (12)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando

Demando de la Jubileo:

Kien celi en la dua jarcento?



Vi trovos,

ke la esperantologoj ĉefkuiristas ĉi-numere. En la artikolan supon ili ĵetis frandindan ĉefartikolon, iom da acida rebato, kuleregon da simpozia raporto kaj du grandajn bovlojn da zamenhofologio. Eble vi kredas, ke ĉi tiun festan ŝtufpotaĵon ili kreis por inde fermi la Jubilean Jaron? Tiam rerigardu p.196 en nia lasta numero! Tiu ĉi estas nur veturmanĝo survoje al Roterdamo, kie la Jubileo — okaze de la centunujariĝo de Esperanto — definitive finfestiĝos.

Tiu ĉi estrara decido fakte celas, ke la Jubilea Laborprogramo de UEA estu pli komplete realigita ol ni sukcesis fari ĝis nun. Se oni rerigardas la optimismajn planojn de antaŭ kvin jaroj, oni devas konstati ke UEA aŭ supertaksis siajn kapablojn aŭ subtaksis la organizajn strecĥojn necesajn por profiti de ili. Dirante tion, mi ne celas bagateligi la Unesko-rezolucion de 1985, la Universalan Kongreson en Varsovio kaj inundon da pozitivaj artikoloj en dekoj da landoj tra la mondo! Sed sufiĉis la dek du monatoj de 1987 por festi niajn atingojn. En la lasta duonjaro de la Jubileo, nia revua supo alprenos pli pikan guston. Pri la menuo, atendu januaron!

Enhavo

209 Centjara jubileo de Esperanto: Atingoj kaj problemoj de la 100-jara Esperanto (Detlev Blanke); La "de-ekstera" iluzio (André Albault)
211 Esperantologio: Rimarkinda simpozio montras la vojon (Humphrey Tonkin)
212 Eksteraj rilatoj: Pac-seminario en Helsinki starigis imitindan precedencon (Mark Fettes); Fina dokumento de Helsinki
214 Post jarcento (Mauro Nervi)
Nekrologoj: Pol Denoël (1912-1987); Paul Neergaard (1907-1987)
216 Movada historio: La rilatoj inter d-ro Zamenhof kaj Giuseppe Peano (Bernard Golden)
218 Esperantologio: Zamenhof kaj Eliezer Ben Yehuda: la kaŭzoj de iliaj (relativaj) sukcesoj kiel lingvovivigintoj (W.A. Verloren van Themaat)
220 Belartaj Konkursoj de UEA 1988
221 Recenzo: *Kritikaj studoj defende de Esperanto* de Ivo Lapenna (Bernard Golden)
222 Reagoj: Tamen altas nia poezio (W.A. Verloren van Themaat); Angla propagando? (Lorenc; Mi); Ni emfazu realan komunikadon (Stefan MacGill); Paciencu sed ne rezignu (Gottfried Hofstätter); Zairio enfokusiĝu (Alexandre Rousset); Estrara anarkio? (Germain Pirlot); Spite la spriton... (Rejna de Jong); Solviĝas supersignoj (Dominique Cornice, Roland Rotsaert)
223 Laste aperis (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
224 Oficiala Informilo
225 Fake (mallongaj novaĵoj)
226 Indekso 1987 (gvidilo pri la enhavo de la jubilea jarkolekto)
228 Esperanto en radio (diversaj informoj)
Anoncetoj

La kovrilo

Jen demando: ĉu vi kapablas diveni, sen rigardi la Indekson sur paĝoj 226 kaj 227, kiu temo plej multe okupis la kontribuantojn al la jubilea jarkolekto? Neologismoj? Komputilo aŭ komputoro? Landonomoj? Feliĉe, kiel subkomprenigas nia kovrilo, niaj legantoj montriĝis iom pli seriozaj! Estas ĝuste la debato pri movada strategio, kiu tratempestis niajn paĝojn, postlasante kiel falintajn foliojn amason da proponoj kaj analizoj. Profitu viajn solsticajn feriojn (ĉu vintrajn, ĉu somerajn) por retrorigardo tra tiu bunta rikolto!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: Mark Fettes.
Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.
Telekso: 23721 uea nl.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.
Vicprezidanto (Gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35
Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Jap.; tel. (3) 770 64 86; telekso 02655177 eki j.
Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.
Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.
Estrarano (financoj): s-ro Gian Carlo Fighiera, Juan Ramón Jiménez 28, 6°A, E-28036 Madrid, Hispanio; tel. 250 39 87.
Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.
Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.
Estrarano (interna agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr 984 (12), december 1987. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Atingoj kaj problemoj de la 100-jara Esperanto

La Jubileo de Esperanto evidente ne signifas, ke la Movado jam atingis siajn celojn: male, ĝi povas servi por konsciigi nin pri la grandegaj taskoj, kiujn ni ankoraŭ frontas. La jena artikolo estas bazita sur la prelego de Detlev Blanke kadre de la 10a Esperantologia Konferenco en Varsovio, kiu li emfazis la sociologiajn aspektojn de la lingvo.

Por sojle de la dua jarcento baziĝi je la pozitivaj spertoj de la 100-jara Esperanto, por lerni el eraroj kaj por solvi ankoraŭ nesolvitajn problemojn, necesas multflankaj analizoj. Prijuĝo de la atingita pozicio de la lingvo nur el la vidpunkto de la tradiciaj Esperanto-komunumaj celoj povas konduki al pesimismo, miskomprenoj kaj retiriĝo al elitismaj pozicioj. Aliflanke estas evidente, ke la pasintaj cent jaroj ne donis objektivan bazon por pli vasta oficiala internacia utiligo de la lingvo. Du mondmilitoj, revolucioj, diktatoraj reĝimoj, internaciaj streĉitecoj kaj la fakto, ke la situacio de internacia lingva komunikado ankoraŭ ne atingis la krizan punkton, grandparte klarigas la relativecon de la sukceso de Esperanto.



Detlev Blanke, i.a. sekciestro pri Esperanto en Kulturligo de GDR kaj komitatano de UEA, estas unu el la plej konataj esperantologoj en la nuntempa movado. Liaj opinioj ofte vekas viglan debaton: vd. ekz. p.210 kaj 221 ĉi-numere.

Konstateblas i.a. jenaj ĉefaj atingoj.

1. Ke la lingvo malgraŭ malfavora historia situacio pli kaj pli vaste aplikiĝis, evoluadis kaj fariĝis certagrade kultur-politika faktoro, *mem estas ĝia plej granda atingo.* La objektivaj procesoj de la scienc-teknika revolucio kaj la iom-post-ioma plidemokratiiĝo de internaciaj rilatoj (Fina Akto de Helsinki, Unesko-politiko, malarmad-klopodoj) nur antaŭnelonge malfermis veran perspektivon por Esperanto.

2. Plua atingo estas la senkonkurenceco de Esperanto kompare al aliaj planlingvaj sistemoj, malnovaj kaj daŭre nove aperantaj. La senkonkurenceco de Esperanto konsistis ĉefe en ĝia sufiĉa "lingva boneco" (Wüster) kaj la sufiĉeco de ĝia parolantaro, kiu ebligas daŭre pli vastan kaj pli diferencitan aplikon kaj pro tio evoluon de la lingvo kaj inverse. Tiu funkcianta Esperanto-parolantaro estas mikro-modelo de optimumigita internacia lingva komunikado, sendiskriminacia kaj principe altefika. Ĝi tiel respondas al la senco de la 11a Marksa tezo pri Feuerbach, parafrazita interlingvistike jene: "La lingvistoj ĝis nun nur diversmaniere priskribis la mondan lingvoproblemon, sed necesas solvi ĝin."

3. La funkcianta Esperanto estas nova fenemeno por la lingvoscienco, deviganta rompon de kelkaj lingvistikaj mitoj kaj ĵetanta novan lumon sur la rilaton inter homo kaj lingvo.

La kaŭzoj de la relativa sukceso de Esperanto estas (a) lingvostrukturaj (sufiĉa lingva boneco) kaj aparte (b) nelingvaj, lingvopolitikaj faktoroj, ĉar la lingvo estas multe pli ol strukturo, nome socia fenomeno firme ligita al homaj grupoj kun komunikaj celoj, bezonoj kaj ide(al)oj, kiuj pli gravas por lingva sukceso ol unuopaj lingvaj ecoj mem. La nekompreno de tio estas bazo por sennombraj novaj projektoj kaj por la sinteno de multaj esperantistoj, kiuj volas solvi lingvostrukture problemojn de Esperanto, kiuj nur solveblas lingvopolitike. Kontraste al multaj planlingvaj aŭtoroj, Zamenhof saĝe kondutis en tiu rilato. Interalie, li ĝuste aliris la problemojn de: **(a)** projekto/lingvo, **(b)** individuo/kolektivo, **(c)** humanisma enhavo kaj larĝeco de la komunikaj celoj, **(d)** elito/amasoj, **(e)** evoluo/stabileco. Ĉiuj ĉi problemoj estas hodiaŭ plene aktualaj kaj ofte ne sufiĉe atentataj.

Sojle de la dua jarcento de Esperanto necesas konscii pri kaj solvi kelkajn problemojn, fundamente gravajn por la estonteco de la lingvo.

1. Necesas sciencnivele kaj sisteme esplori ne nur la ĝeneralajn ecojn de Esperanto devenantajn el ĝia *lingveco,* sed ankaŭ ĝiajn specifajn ecojn devenantajn el ĝia *planiteco.* La ĝenerala ignoro de ĉi tiu specifo, la senzorga kaj tro absoluta fido al la "natura" evoluo de la lingvo, malhavigos al Esperanto grandajn avantaĝojn (ekz. en la fakleksiko), pri kiuj etnolingvoj disponas nur en pli limigita grado. Necesas sisteme pliatigi la faktoron de konscieco, evoluigi pli kritikan lingvan kulturon kaj, i.a., principe rekonsideri la taskojn, funkciojn, labormetodojn kaj konsiston de la Akademio de Esperanto, kiu komplete ne sufiĉas al la nuntempaj bezonoj de la lingva komunumo de Esperanto.

2. La ĝenerale nekontentiga situacio de la esperantologio ŝuldiĝas ne nur al la esperantologoj mem, sed unuavice al la manko de lingvopolitika kompreno en la Esperanta lingva komunumo. En la esperantologiaj aktivecoj regas i.a. hazardeco, nesistemeco, nesufiĉa rapido en la pretigo de ege necesaj verkoj (ekz. nova eldono de PIV, Bildvortaro), hobieco, manko de konscio pri prioritataj taskoj, manko de materia bazo. Ne nur la ekstermovadaj postuloj al la esperantologio flanke de DLT kaj la pliinteresiĝo de la moderna lingvoscienco, sed ankaŭ la konkretaj evoluantaj komunikaj bezonoj (ekz. en la fakaj sferoj) i.a. necesigas:

— ellaboron de klaraj esplorprogramoj kun indiko de prioritatoj;
— stimuladon kaj kunordigadon de esploroj;
— profesiigon de esperantologiaj esploroj (ĉefe per bazoj je nacia nivelo);
— denove, kompletan rekonsideron de la rolo de la Akademio de Esperanto.

Inter la multaj urĝaj taskoj, kiuj postulas la atenton de esperantologoj, estas la priskribo de la nuna Esperanto (sinkronio) kaj ties evoluo-tendencoj (diakronio), la pretigo de bazaj verkoj kun ampleksaj bibliografioj (i.a. moderna gramatiko kaj sistema leksikologio), la kunordigita ellaboro de grandaj kaj mezgrandaj vortaroj inter naciaj lingvoj kaj Esperanto, la kunordigado de terminologia agado en la kadro de la ĵus fondita Terminologia Esperanto-Centro kaj kreo de altnivelaj fakvortaroj, la esplorado pri la heŭristika valoro de Esperanto (i.a. propedeŭtika instruado, valoro por maŝintradukado), esploroj pri la lingva komunumo kaj certigo de materiaj kondiĉoj (i.a. esperantologia revuo).

La konsisto kaj internaj procesoj de la lingva komunumo speguliĝas en la lingvo mem — per stilo, ideologiodependa leksiko, esperantonimoj, eliteca "lingvoevoluigo" — kaj helpas aŭ malhelpas la aplikon kaj evoluon de la lingvo. Pro tio necesas i.a. sociologiaj esploroj pri la konsisto, esperantiĝo-motivoj, celoj kaj kondutmanieroj de la komunumanoj. Ili necesas por tiri konkludojn, kiel celkonforme gvidi la komunumon, varbi novajn adeptojn, veki latentajn potencojn aŭ subpremi nedeziratajn fenomenojn. Necesas ankaŭ rekonsideri kelkajn strukturajn problemojn de la komunumo, i.a. la sistemojn de: publikigado, edukado, scienca aplikado kaj la internaciaj aranĝoj (inkluzive kaj ĉefronte la Universalajn Kongresojn).

La rilato de la neesperantista mondo al Esperanto kaj ĝia lingva komunumo ofte estas stampita per antaŭjuĝoj. Tiuj troviĝas ne nur ekster la komunumo, sed ankaŭ en la komunumo mem. Parton de ambaŭ faktoraj grupoj oni povas pozitive influi, aparte per serioza laboro kaj certe ne per bojkotado de naciaj lingvoj, ŝanĝo de la lingvonomo Esperanto aŭ aliaj paŝoj. Necesas ellaboro de "principaro de konduto, informado kaj argumentado".

Por ke la interlingvistiko povu enigi Esperanton en la lingvosciencan konscion, oni devas kompreni ĝin ne malvaste kiel "scienco pri planlingvoj", sed en larĝa socipolitika kadro kiel "lingvoscienca disciplino esploranta ĉiujn aspektojn de la internacia lingvo komunikado cele al ĝia optimumigo".

Jen superrigardo pri la solvendaj problemoj kaj taskoj, kiujn ni frontas fine de la unuaj cent jaroj de Esperanto. Por atingi pli sisteman esploron de ili, konvenus fondo de konstanta "Internacia Konsilantaro: Esperanto — Lingvo kaj Movado", kiu estus sendependa instanco de ekspertoj. La konsilantaro traktu la lingvon kaj ĝian komunumon kune, utiligu jam ekzistantajn aktivecojn, aranĝojn, instancojn kaj eldonaĵojn. stimulu, kunordigadu kaj eventuale mem entreprenu esplorojn, kaj — fine — ellaboru science bazitajn rekomendojn larĝe disvastigendajn en la lingva komunumo.

Detlev Blanke (Germana DR)

Renkontiĝo por interlingvistoj kaj esperantologoj

La sekva 16a Scienca Interlingvistika Simpozio okazos en Varsovio inter la 27.04. kaj la 01.05.1988 sub aŭspicio de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo de UEA. La aranĝo fariĝis jam tradicia preleg-kaj diskutforumo, kiu kunvenigas fakulojn kaj aliajn Esperanto-movadanojn interesatajn pri diversaj aspektoj de internacia lingva komunikado. La simpozio estos dediĉita al la temo: **Lingvokomunikado kaj lingvo-planado.** La ĉeftemon la organizanto — Akademia Centro Interlingvistika — proponas pridiskuti laŭ jenaj subtemoj:

1) **Kultura kaj socipolitika aspektoj de la lingvo-planado;**
2) **Sociologio de internacia planlingva parolkomunumo;**
3) **Specifeco de Esperanto rezultanta el ties planiteco.**

Laŭ la sugestoj de pasintjaraj partoprenintoj, dum la simpozio okazos ankaŭ diskuto pri:

4) **Strategiaj demandoj de interlingvistiko.**

Interesatoj povas ricevi detalajn informojn de: Akademia Centro Interlingvistika, Ordynacka 9, PL-00-950 Varsovio, Pollando.

La "de-ekstera" iluzio

Nelonge post la apero de la septembra numero, ni ricevis la jenan reagon de la Prezidanto de la Akademio al la lastalinea propono de la d-ro Blanke. Ni bonvenigus pliajn komentojn pri la temo, kaj ankaŭ pri la "la funkcio kaj evoluo de la Akademio" (vd. la artikolon de d-ro Albault en la Jubilea Numero).

La kongres-numero de *Esperanto* interalie raportas pri la opinioj de Detlev Blanke. "Laŭ li, la Esperanta mondo bezonas iun Internacian Konsilantaron de ekspertoj, homoj efektive respektataj kaj aŭskultataj, ne nur interne de Esperantujo sed ankaŭ ekstere." Aliparte li esprimis "sian pesimismon pri la efektiva funkcio kaj evoluo de la Akademio".

Mi estus preta aprobi la opiniojn de nia eminenta socipolitika kaj esperantologia eminentulo, se la praktiko kaj la historio de nia movado ne trudus siajn kontraŭargumentojn. Mi tamen unue konstatu, ke nia germana amiko nete sed noble rifuzis kandidati por posteno de ano de la Akademio de Esperanto. Supozeble, li ne opiniis sin sufiĉe eminenta por eniri tiun Zamenhofan institucion kaj do ankaŭ ne la "Internacian Konsilantaron".

Do, la unua demando estas: se eĉ Detlev Blanke ne estas sufiĉe eminenta, kie do, kiun do ni povos trovi sufiĉe kompetentan? Ĉu ekster la movado?

Aliparte, ankaŭ mi ja dezirus, ke plej kompetentaj homoj alprenu la taskojn en ĉiuj niaj institucioj: de la lokaj grupoj ĝis nia monda UEA, pasante tra la estraroj de la

Rimarkinda simpozio montras la vojon

La Jubileo de Esperanto montriĝis okazo por vera amaso da konferencoj kaj aliaj aranĝoj iel ligitaj al esperantologio. En Vieno fine de oktobro okazis ankoraŭ unu. Sed efektive ne temas simple pri "ankoraŭ unu" konferenco, sed pri elstara aranĝo, kiu kunigis imponan grupon de konataj esperantologoj el pluraj universitatoj de Eŭropo kaj Nordameriko en tritagan simpozion, kiu ĝuis aŭspicion de edukaj kaj kulturaj instancoj en- kaj eksterlandaj.

Apogon de plej altaj ŝtataj instancoj por tiu ĉi "Internacia Scienca Simpozio Esperanto 100-jara" montras la subvencio de la Federacia Ministerio pri Scienco kaj Esplorado; aŭspiciis ĝin ankaŭ la urbaj aŭtoritatoj de Vieno, la Federacia Ministerio pri Edukado, la direktoro de la Aŭstria Nacia Biblioteko, la rektoro de la Universitato de Vieno kaj la Aŭstria Unesko-Komisiono. El eksterlando venis apogo de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino, la Internacia Scienca Akademio Comenius kaj, nelaste, nia Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). Temis fakte pri la kvara scienca esperantologia konferenco aŭspiciita de CED en la

Inter konataj vizaĝoj en Vieno estis tiuj de Klaus Schubert (maldekstre), Ottó Haszpra kaj Michel Duc Goninaz. Hans Michael Maitzen (dekstre) kunordigis la simpozion, kunlabore kun Herbert Mayer.

Landaj Asocioj. Eventuale, ili ĉiuj estu kompetentuloj de ekster la movado: ili esperantistiĝu kaj surprenu la taskojn; nia movado estas ja entrepreno por la tuta homaro! Kaj ĉar ili estas kompetentaj ekstere, ili certe pli bone ol ni, nespecialistoj, kapablus konduki niajn aferojn. Mi tiam plej volonte retiriĝus kaj lasus mian sendankan sed laborplenan postenon al kompetenta lingvisto, kiu sendube rapide kapablas mastri la lingvon. Tiel same agus aliaj; inter ili certe s-ino Wera Blanke, kiu cedus sian postenon de Sekretario de Terminologia Centro al iu universitata profesoro.

La dua demando tamen estas: ĉu tio ne sonas iom false?

Neniam oni estas tiel bone servitaj, kiel per siaj propraj prizorgoj kaj klopodoj! Cetere, kion do instruis al ni la historio? Ĉu neniu memoras pri la epizodo de la "Delegacio por alpreno de Internacia Lingvo", kiu naskis Idon? La Prezidanto estis Wilhelm Ostwald, eminenta kaj monde konata sciencisto, dum vic-prezidantoj estis Jan Baudouin de Courtenay kaj Otto Jespersen, pola kaj dana lingvistoj ankoraŭ citataj en nuntempaj verkoj. Jen homoj el la speco de tiuj deziratoj de nia germana amiko. Sed hodiaŭ, kie do estas Ido, de ili tri favorata, helpata kaj eĉ "gvidata" dum pluraj jaroj?

La afero renoviĝis kun la epizodo de International Auxiliary Language Association. Plej brilajn lingvistojn, inter ili André Martinet, tiu asocio kunigis: ĝi kreis novan projekton "Interlingua"... kiu nun dormas en kelkaj resumoj de medicinaj gazetoj el Usono, krom en hodiaŭaj publikigaĵoj de iuj esperantistoj!

Estas evidente, ke eksteruloj povos alporti ideojn nur el ekstere. Tamen dume aperas tute alia fenomeno: la movado mem naskas homojn el siaj vicoj; ĝi faras ilin tute kompetentaj esperantistoj; ili estas pli kaj pli multaj kun la paso de la jaroj kaj la etendiĝo de nia movado. Aliparte kaj paralele kelkaj el ili fariĝas eminentaj en sia fako: ili fariĝas konataj en la ekstera mondo; ĉiuj pensas pri Privat, profesoro en la Universitato de Neufchâtel, profesoro Canuto, rektoro de la Universitato de Parma, kaj multaj aliaj — inter kiuj ni citu profesorojn Setälä, Sirk, Yagi kaj la nun ankoraŭ agantajn Lapenna, Régulo Pérez kaj kelkajn aliajn. Inter pli junaj ni citu Wells, Blanke mem kaj la ĵus forpasintan Szerdahelyi. Ili reprezentas la unuan kohorton, kiu sendube estos sekvata de multe pli nombraj el la nova generacio. Ili unue estas esperantistoj, due ili iĝas eminentuloj ekstere, sed trie kaj ĉefe ili konsentas efektive labori interne. Se ne ekzistas tiuj tri kondiĉoj, eblas dubi pri la rezultoj.

En 1887, Zamenhof sin kaŝis malantaŭ la pseŭdonomo "Doktoro Esperanto". Efektive li esperis, ke la legantoj ne deziros informiĝi pri la persono mem de la aŭtoro de tiu modesta broŝuro, de la aŭtoro de nia "Unua Libro", sed ke ili konsentos atenti la frukton de ties pensado. Li estis nur la senfama Iniciatoro de nova lingvo. Tiu ĉi parte konkeris la tutan mondon. Tion ja ne kapablis fari multe pli konataj lingvistoj, kiuj tamen projektis sur tiu tereno! Kial? Ĝuste, ĉar por tiu ĉi aparta temo ili neniel estis kompetentaj, malgraŭ siaj kompetentoj sur aliaj kampoj kaj malgraŭ siaj laŭtaj titoloj. Mankis al ili kaj la kompetento kaj la laboremo sur tiu ĉi speciala kaj aparta kampo de internacia lingvo. Zamenhof havis ne nur ĉion ĉi, sed plie ia amon.

Esperantistoj neniam forgesu tion!

André Albault
(Prezidanto de la Akademio de Esperanto)

jubilea periodo: aliaj okazis en Parizo, Novjorko kaj Tokio.

Iom pli ol cent aliĝintoj ĉeestis la simpozion, lokitan en la Universitato de Vieno (kaj kunorganizitan de ties Instituto pri Lingvistiko). Tie ili aŭdis dudekon da referaĵoj pri lingvistikaj, historiaj, literaturaj, pedagogiaj kaj sociologiaj temoj en Esperanto kaj la germana. Inter la prelegantoj estis Claude Piron (Svislando), kiu kontribuis du referaĵojn, Klaus Schubert (FRG/Nederlando), kiu donis aktualajn informojn pri la komputiltraduka projekto DLT, Ulrich Lins (FRG), Michel Duc Goninaz (Francio), kiu parolis pri la verkoj de Gaston Waringhien, Rüdiger Eichholz (Kanado) kaj Ottó Haszpra (Hungario). Ankaŭ la subskribinto prezentis referaĵon.

En la organizado de la simpozio partoprenis ĉiuj aŭstriaj Esperanto-organizaĵoj, kaj aparte gravan rolon ludis la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEMW) — efekti-

Jam de 1930 IEMW situas en la impona viena "Hofburg".

ve sekcio de la Nacia Biblioteko. La simpozianoj faris viziton al la muzeo, kie ili notis plurajn signifajn ŝanĝojn. Siatempe la muzeo estis unuavice kolektejo por esperantaĵoj, interesaj en si mem sed neniel organizitaj science. Oni rimarkas, ke nun la direkto de la muzeo iom ŝanĝiĝis: ĝi celas fariĝi unuavice scienca institucio, esplorejo, centro por la bibliografio de Esperanto. Tiu evoluo estas tre salutinda. Dum la pasinta deko da jaroj, la studo de esperantologio kaj interlingvistiko vere eksplode kreskis, kaj estas urĝe bezonata pli firma scienca substrukturo en la formo de konsulteblaj bibliotekoj, esploriloj diversspecaj, kaj bonaj kondiĉoj por la interŝanĝo de ideoj. CDELI en La Chaux-de-Fonds, la Fako pri Esperanto en la budapeŝta Universitato Eötvös Loránd (kie la bedaŭrinda manko de prof. Szerdahelyi longe sentiĝos), kaj nun IEMW, kune montras la vojon. Eble baldaŭ sekvos la Centro Zamenhof en Bjalistoko.

Gratulindaj estas Hans Michael Maitzen, Herbert Mayer kaj ĉiuj kunlaborintoj en la organizado de tiu rimarkinda viena simpozio.

H. Tonkin

Pac-seminario en Helsinki starigis imitindan precedencon

En 1983, okaze de la 68a Universala Kongreso en Budapeŝto, kelkaj estraranoj de UEA renkontis la prezidanton de Monda Pac-Konsilio, s-ron Ramesh Chandra. Dum ilia interparolado, s-ro Chandra esprimis notinde grandan entuziasmon pri Esperanto; kaj li proponis, ke oni iam okazigu komunan seminarion inter UEA kaj MPK, por diskuti la ligojn inter la Esperanto- kaj la pacmovadoj kaj la perspektivon kunlabori por komunaj celoj.

Ĉi tiu paŝo estas iom nova afero por UEA, ĉar oni ĝenerale rekonas ke Monda Pac-Konsilio, same kiel ekzemple MEM, ne estas politike neŭtrala organizaĵo. Efektive, estus malfacile trovi pac-organizaĵon kiun oni ne akuzas esti membro de iu aŭ alia "bloko"; eĉ UEA estas ofte konsiderata "tro okcidenta", "tro orienta" aŭ "tro norda" en la konstanta laŭkompasa etikedado ĉe Unesko kaj aliaj internaciaj forumoj. Tamen estas tute klare, ke MPK ja multe diferencas de UEA en siaj politikaj orientiĝo kaj emfazo. La demando estas: ĉu tio forbaras ĉiujn formojn de kunlaboro? Evidente ne. Unu celo de la Movado kaj de UEA estas ĝuste plifaciligi la egalecan diskutadon de la gravaj mondaj problemoj, inkluzive tiun de paco, por ĉiuj partoprenantoj sendepende de ideologio kaj aliaj diferencoj. Kaj ĉi tia rekta (eĉ se dece singarda) interrilatado kun aliaj mondaj organizaĵoj, neŭtralaj kaj neneŭtralaj, povas doni al UEA aparte efikan rolon en la disvastigado de Esperanto.

Tiel estis, ke dum la 31a de oktobro kaj la 1-a de novembro, 1987, kunvenis ĉ. 25 esperantistoj kaj deko da reprezentantoj de MPK ĉe la sidejo de la Konsilio en Helsinki, Finnlando. Flanke de UEA, ĉeestis prezidanto Humphrey Tonkin, estrarano kaj reprezentanto ĉe Unesko Barbara Despiney, TEJO-prezidanto Jan Koszmaluk kaj oficistoj Osmo Buller kaj Mark Fettes; de la najbaraj Landaj Asocioj venis Douglas Draper kaj Marianne Lund el Norvegio, Märtha Andréasson kaj Elisabeth Ahlgren el Svedio kaj Andrzej Pettyn el Pollando, dum dekkvino da membroj de EAF kaj FEJO reprezentis Finnlandon. Flanke de Mondpaca Esperantista Movado, kiu kunlaboras kun kaj UEA kaj MPK, ĉeestis prezidanto Imre Pethés kaj ĝenerala sekretario Clément Tholet.

S-ro Chandra mem estris la delegacion de MPK, kiu cetere konsistis plejparte el stabanoj de la sidejo: svedino Marilyn Olsson, polo Ryszard Tyrluk, maliano Mamadou Sako, hindoj Cherian Eapen kaj Bhagat Vats, libanano Sana Abou Chakra kaj bulgaro Kosta Ivanov. El Islando venis edukisto Nina Baldvinsdottir, kiu kunportis pretan Esperantan tradukon de sia prelego — faritan de ŝia estro Baldur Ragnarsson.

Laborlingvoj de la seminario estis Esperanto kaj — laŭ elekto de MPK — la angla. (Oni rimarkis, ke Esperanto efektive funkciis multe pli bone inter la diversnacianoj!) La temo, laŭ propono de UEA, estis "Interhoma kompreniĝo kaj interpopola paco". Kiel oni povus atendi, la esperantistaj prelegoj estis pli klare fokusitaj ĉe la temo ol tiuj

de la MPKanoj, ĉar ja temas pri "nia" filozofio; sed ankaŭ la konsilianoj kontribuis utilajn pensojn kaj sugestojn.

Reprezentajn partojn de la prelegoj ni aperigos en la januara numero de la revuo, el kiuj vi povos formi pli klaran impreson pri la enhavo de la seminario. D-ro Tonkin konstruis sian prelegon ĉirkaŭ la Deklaro de Bjalistoko (vd. *Esperanto* 1987/p.154), kaj ĝenerale la esperantistaj paroladoj emfazis la ligojn inter la Esperanto-movado kaj la ekstera socio; simile, la tonon de la konsiliaj paroladoj donis s-ro Chandra, per enkonduko en kiu li substrekis la deziron de MPK kunlabori kun kiel eble plej multaj organizaĵoj kun la plej diversaj celoj. Inter la prelegoj okazis iom da diskuto, kiu tre utilis por reliefigi la diferencojn kaj komunaĵojn inter UEA kaj MPK. Malhelpis tion precipe la temporaba interpretado! Aliflanke, la konstanta uzo de Esperanto apud la angla bonege reliefigis ĝian funkciadon en la praktiko, kiu evidente imponis plurajn MPKanojn.

El la prelegoj kaj diskutoj elkreskis pli klara bildo pri komunaj interesoj, kio finfine rezultigis la adopton de konkluda dokumento de la seminario, ferme de la dua tago. Tiu ĉi interkonsento, represita ĉi-sube, povus esti modelo por similaj interkonsentoj je loka, landa aŭ internacia nivelo, kiuj ligus la Esperanto-movadon kun aliaj organizaĵoj aŭ movadoj. Ĝi emfazas tiujn analizojn kaj celojn, kiuj komunas al la du ĉefrolantoj, kaj lasas flanken la diferencojn. Ĉar la internacia komunikado rolas pli kaj pli centre en diversaj sferoj de la vivo, devas ekzisti multaj organizaĵoj, kiujn oni povus interesi pri limigita kunlaboro: ne insistante, ke ili oficialigu Esperanton aŭ anstataŭigu per ĝi aliajn lingvojn, sed emfazante ĝian jaman utilon kiel lingvo de unike internacia komunumo.

La respondeculo pri plenumo de ĉi tiu programo ĉe la Centra Oficejo estas Mark Fettes, tiu en Finnlando estas Osmo Buller (vd. "Belartaj Konkursoj" por adreso), kaj en la Estraro temas precipe pri Tonkin kaj Despiney. Ĉiuspecaj reagoj estas bonvenaj ĉe la redaktoro.

Mark Fettes

Fina dokumento de Helsinki

1. Kompreniĝo inter individuoj estas esenca elemento en daŭra paco. Paco estas pli ol la neesto de milito: ĝi konsistigas ŝanĝon en la maniero, laŭ kiu la homoj pensas unu pri la alia, kaj tio siavice postulas kiel antaŭkondiĉon la kompreniĝon.

2. La elkreo de daŭra paco kaj antaŭenigo de malarmado proksime rilatas al (1) forigo de aliaj grandaj mondaj problemoj, inkluzive naturmediajn problemojn, malsaton, malsanon, analfabetecon, diskriminacion kaj militismon; (2) antaŭenigo de evoluo, kaj (3) kreado de egaleco, libereco, demokrateco kaj respekto al homaj rajtoj tra la tuta mondo.

3. Kompreniĝo postulas forigon de stereotipoj kaj antaŭjuĝoj, inkluzive la bildigon de aliaj kiel malamikoj, kaj ĝin oni plej bone atingas per rekta komunikado inter individuoj.

4. La manko de komuna lingvo estas granda obstaklo al komunikado. Ĝi malhelpas laboron por paco. La internacia lingvo Esperanto konsistigas gravan rimedon, per kiu atingi rektan komunikadon, kaj ĝi povas esti signifa komunikilo por tiuj, kiuj laboras por paco.

5. Same tiel, la lingva komunumo de Esperanto povas konsistigi aparte efikan forumon por diskutado kaj medion por agado cele al internacia kompreniĝo kaj paco.

6. Per kreo de spirito de kompreniĝo inter homoj el ĉiuj landoj kaj vivosferoj, oni instigos kaj devigos la registarojn priatenti demandojn, kiuj rilatas al starigo kaj antaŭenigo de malarmado.

Sekve, la du organizaĵoj konsentas entrepreni la jenan agadon:

1. Ĉiu organizaĵo invitos la alian partopreni aŭ observi taŭgajn kunvenojn kaj konferencojn.

2. La du organizaĵoj konsentas kunlabori kadre de la Speciala Sesio pri Malarmado de la Ĝenerala Asembleo de UN en 1988 kaj por festi la 40an datrevenon de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj.

3. En la kadro de Unesko, la du organizaĵoj konsentas kunlabori en agadoj, kiuj rilatas al la Monda Jardeko por Kultura Evoluigo.

4. UEA ludos aktivan rolon en la konferenco de neregistaraj organizaĵoj pri elradikigo de la bildo de la malamiko, kiun organizos MPK kune kun aliaj neregistaraj organizaĵoj en Ĝenevo, februaron 1988.

5. UEA konsentas antaŭenigi la diskuton pri la temo de paco, kadre ankaŭ de la diskuto pri internacia kunlaboro kaj kompreniĝo, en ĉiuj siaj agadoj, inkluzive de la laboro je loka kaj landa niveloj; tiucele, kun helpo de MPK, ĝi publikigos taŭgajn diskutmaterialojn kaj distribuos ilin pere de siaj aliĝintaj kaj kunlaborantaj organizaĵoj.

6. UEA daŭre elstarigos la antaŭenigon de la paco, ekzemple per speciala Tago de la Paco en la Universalaj Kongresoj, kaj kune kun sia junulara sekcio, TEJO, daŭre emfazos tiun temon en ĉiuj taŭgaj konferencoj kaj kunvenoj de UEA kaj TEJO.

7. MPK konsentas antaŭenigi la uzon de Esperanto kiel komunikilo ene de la pacmovado, konsilate kaj helpate de UEA.

8. UEA konsentas traduki en Esperanton taŭgajn materialojn de MPK de tempo al tempo, kaj helpi pri ilia distribuo.

9. MPK kaj UEA kunlaboros pri agadoj sekvaj al ĉi tiu seminario, inkluzive de la ebleco organizi konferencon pri Lingvo kaj Paco en Parizo, 1989, al kiu aliaj neregistaraj organizaĵoj estos invititaj. Oni petos la subtenon de Unesko por tiu ĉi iniciato.

10. MPK kaj UEA kunmetos la referaĵojn el ĉi tiu seminario kaj aranĝos la publikigon de la plej reprezentaj referaĵoj en eldonaĵoj de la pacmovado kaj la Esperanto-movado.

La partoprenantoj esprimis la esperon, ke la baldaŭa pintkunsido inter Usono kaj Sovetunio konsistigos unuan paŝon al elimino de nukleaj armiloj kaj redukto de internacia streĉiteco.

Helsinki, 1 novembro 1987

Nekrologoj

Pol Denoël 1912-1987

La 14an de oktobro forpasis en sia hejmurbo Liego (Belgio) d-ro Pol Denoël, kuracisto, urba konsilisto kaj altlerneja docento, Honora Prezidanto de Belga Esperanto-Federacio kaj Honora Membro de UEA.

D-ro Denoël lernis la Internacian Lingvon jam kiel 14-jara gimnaziano en 1926, kaj tra ĉiuj postaj jardekoj restis ne nur ĝia fidela adepto sed ankaŭ unu el la plej elstaraj movadaj aktivuloj en Belgio. En 1931 li iniciatis la nun ankoraŭ okazantajn Trilandajn Renkontiĝojn en la landlima regiono inter Belgio, Germanio kaj Nederlando. Li aktivis en la laborista Esperanto-movado antaŭ la Dua Mondmilito, post kiu li helpis restarigi la lokan grupon en Liego, kies prezidanto li estis de 1960 ĝis 1980. D-ro Denoël estis prezidanto de Belga Esperanto-Federacio (1970-1980), komitatano de UEA (1971-1980), gvidanto de Eŭropa Esperanto-Centro (1973-1978), kunfondinto kaj unu el la unuaj estraranoj de Someraj Universitataj Kursoj en Liego.

Apartan ĉapitron en la movada agado de d-ro Denoël prezentas lia laboro kiel estrarano de UEA (1974-1980). Li eniris la Estraron dum la Kongreso en Hamburgo kaj ricevis malfacilan taskon prizorgi i.a. "rilatojn kun Esperanto-organizaĵoj kaj specialajn agadojn". Taktoplena kaj pacienca kun ĉiuj, respektata de ĉiuj, Denoël havas multajn meritojn, ke la ŝanĝoj okazintaj en Hamburgo ne transformiĝis en movadan skismon de pli granda skalo.

La lernolibro *Initiation théorique et pratique ă la langue internationale Espéranto,* kiun d-ro Denoël verkis en 1934, atingis ĝis nun 6 eldonojn kaj restas unu el la popularaj lerniloj por franclingvanoj. En 1968 aperis lia eseo *L'espéranto dans l'enseignement* (Esperanto en la instruado), kaj en 1981 Someraj Universitataj Kursoj eldonis lian fakan kajeron *Elementoj de homa fiziologio en rilato kun edukado.* Atentinda fakto estas ankaŭ tio, ke la tuta familio de d-ro Denoël parolas la Internacian Lingvon, kies valora kaj memorinda apoganto li estis tra sia tuta vivo.

Mauro Nervi (Italio):

Post jarcento

Mi pledas por diskreto, amikoj: ĉar silento,
deco kaj sekreto funde kernas
en niaj sentoj. Poezio
malprivatas, kaj ni volas lasi for
narkotajn versojn, kaj la suplajn mondokredojn
kiuj forceje kreskas. Densa aero ne sufoku
ĉi amindan markoton de la lingvo, kies gajan vivoforton
nur la pezaj bombasto kaj stulteco plu minacas.

Kaj se venos glacio, des pli libere la aeron ni enspiros:
ĉar ni ŝatas malvarmon, kaj konscio vivpenetra
fariĝis nia humaneco. Tiom duraj post jarcento,
kompatemon ni simple gestas for, kaj la malsanon,
eĉ nian propran, ni forgesas volonte. Ne al paco
sed al milito ni aspiras, kamaradoj; jen, ĉi klingon
ni devas utiligi. Racio, moralo kaj atento
premisas la lukton de l'poetoj: kaj, kvazau ŝnurdancistoj,
ili bezonas ekvilibron. Vidu, poetoj promenas sur fadeno
alte en placoj... akrobate
moviĝas arto, ĉiam. Poezio estas
fizika lerto kaj sento de malpleno.

Sed finfine, ja temas pri komenco
de io granda. Tagiĝe sunradioj kolizias
el ĉi kristala oriento, dum la frosto
forblovas stelojn. Por lucido
mi pledas: fridan mistralon ni amas, kaj serenan
ĉielon, kontrau siroko kaj ĉia suda vento.

Paul Neergaard (1907-1987)

La 13an de novembro, 1987 en la aĝo de 80 jaroj, mortis la renoma sempatologo kaj esperantisto Paul Neergaard en Kopenhago, Danlando. Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA de post 1980 kaj Akademiano jam de 1934, Neergaard estis unu el la plej elstaraj sciencistoj kiuj aktive batalis por la Internacia Lingvo.

Pierre Paul Ferdinand Mourier de Neergaard naskiĝis la 19an de februaro 1907 en Nyborg, Danlando. Li diplomiĝis pri agronomio kaj iĝis specialisto pri la genetiko kaj patologio de plantoj. Dum multaj jaroj li estris sekcion de la dana Ŝtata Plantpatologia Servo; en tiu periodo li grave rolis en la difino de nova disciplino, "sempatologio", kiu traktas la malsanojn — ofte ekonomie katastrofajn — portatajn de semoj. Internacian kunlaboron sur tiu kampo li pioniris inter 1956 kaj 1974, kiel prezidanto de la plantpatologia komitato de la Internacia Semkontrola Asocio: tiu komitato fakte montris la vojon por la internaciiĝo de aliaj agronomiaj fakoj. En 1967 kronis lian karieron posteno kiel la unua direktoro de la Dana Ŝtata Instituto de Sempatologio por Evolulandoj, kiu donis al li la eblecon, al kiu li delonge sopiris, intense okupiĝi pri la disvastigo de tekniko kaj scio inter la malriĉaj landoj de la mondo. (Li lekciis krome kiel gastprofesoro en universitatoj de Libano kaj Hinda Unio.) Tiu laboro portis al Neergaard multajn honorojn, inkluzive de membreco en la Hinda Nacia Akademio de Sciencoj, Franca Akademio de Agrikulturo kaj Esplorista Klubo de Novjorko. Ankaŭ kiel faka aŭtoro kaj esploristo li fariĝis tre konata, verkante multajn studojn en la dana, la angla kaj Esperanto. Inter tiuj elstaras lia monumenta ĉefverko, la pli ol 1200-paĝa *Seed pathology* ("Sempatologio"; Macmillan, 1977). Unu el liaj lastaj libroj, *Seed — A Horse of hunger or a Source of Life?* ("Semo — Malsat-inkubo aŭ vivofonto?", 1986), enhavas gravan anglalingvan eseon pri la lingva problemo en la sciencoj.

Efektive, jam de 1925 Neergaard estis konvinkita pri la estonteco de Esperanto kiel scienca lingvo. En *Enciklopedio de Esperanto* (1933) li listiĝas kiel i.a. aŭtoro de kvinlingva ĝardenkultura terminaro, kies seslingva eldono aperis en 1938. La jarraportoj de lia laboratorio inter 1935 kaj 1950 ĉiam portis Esperantan resumon. En 1954 aperis lia referencverko *Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj,* kaj en 1957 la populariga verko *La vivo de la plantoj* (eldonita de J. Régulo), kiu tre sukcesis en siaj danaj versioj (teksta kaj brajla) kaj tradukiĝis el Esperanto en la bulgaran, ĉinan, finnan, litovan, norvegan, polan, portugalan, serbokroatan kaj svedan. Tiu libro fakte ankoraŭ modelas por fakaj verkoj en nia lingvo. Neergaard prelegis dekfoje en la Universalaj Kongresoj, oficante kvarfoje kiel ISU-rektoro. En 1962 li prezidis grupon de sciencistoj, kiu kunvokis la Unuan Internacian Konferencon pri la Lingva Problemo en la Scienco kadre de la 47a UK en Kopenhago (ĉe kiu li cetere rolis kiel LKK-prezidanto). Delonge membro de ISAE kaj dum pluraj jaroj ĝia vicprezidanto, li estis ankaŭ fonda membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino kaj mem fondis (nur pasintjare) la Internacian Sciencan Akademion Comenius, kiu celas kunigi je internacia nivelo la plej eminentajn Esperanto-parolantajn sciencistojn por plialtigi la prestiĝon de la lingvo. Estos vere inda monumento je la memoro de ĝia unua prezidanto, se la Akademio sukcesos post li pluvivi kaj prosperi.

Ne nur en sia profesia fako sed ankaŭ sur la tereno de esperantologio Neergaard havas movadajn meritojn. En 1933 aperis lia unua studo, *Fremdvortoj en Esperanto;* klasika estas lia superrigarda eseo *La esperantologio kaj ties disciplinoj,* eldonita unue de la Laborista Esperanto-Klubo de Kopenhago en *Tra densa mallumo* (1942) kaj poste en 1979 ĉe Iltis. De 1949 ĝis 1961 li redaktis entute ses kajerojn de la revuo *Esperantologio,* nia sola altnivela periodaĵo sur tiu pionira kampo, kaj cetere aperigis plurajn artikolojn en aliaj revuoj. Li respondecis pri la terminoj en *Plena ilustrita vortaro* sur la tereno de botaniko, agrikulturo, hortikulturo kaj fitopatologio. De post 1963 li estis vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj direktoro de ties sekcio pri bibliografio. Sian ampleksan bibliotekon (pli ol 60 metroj laŭ bretolongo) li heredigis al la Reĝa Biblioteko de Danlando.

La esperantisteco de Neergaard ne estis io flanka aŭ hobia por li, sed integra kaj esenca ero de lia mondrigardo, kiu celis krei pli justan kaj egalecan mondon per la trafa apliko de la intelekto. Per tiu asociiĝo kaj li kaj la Internacia Lingvo gajnis multon: kaj eĉ post lia morto ĝi restas modelo de konsekvenca agado por celoj samtempe idealismaj kaj firme praktikaj.

La rilatoj inter d-ro Zamenhof kaj Giuseppe Peano

La artikoloj kaj leteroj de d-ro Zamenhof montras, ke li sciis pri pluraj planlingvoj, kiuj estis inventitaj, antaŭ ol Esperanto estis preta[1], kaj ankaŭ pri tiuj, kiuj aperis dum la fruaj jaroj de la evoluo de lia lingvo. Inter ili estis **Volapük** de Johann Martin Schleyer, pri kiu Zamenhof verkis detalan eseon, la universala lingvo de Alberto Liptay, **Mundolingue** de Julius Lott, kaj la plej danĝera rivalo de Esperanto, **Ido** de Louis de Beaufront kaj Louis Couturat. Interesa demando estas: kiom da personaj kontaktoj havis Zamenhof kun aŭtoroj de aliaj planlingvoj? Kvankam li mem ne raportis pri tiaj renkontiĝoj aŭ interparoloj, lastatempe mi trovis informojn pri unu el tiuj kontaktoj, ĝis nun preteratentita fare de historiistoj de la Esperanto-movado. Temas pri Giuseppe Peano (1852-1932), profesoro pri matematiko ĉe la Universitato de Torino, Italio, kiu estas la aŭtoro de projekto de simpligita latino konata kiel **Latino sine flexione** (latino sen fleksioj). Tiu mondfama matematikisto interesiĝis pri la internacilingva demando komence de la nuna jarcento aŭ eble iom pli frue[2].

En Francio Louis Couturat (1864-1914), matematikisto kaj specialisto pri la logistiko, entreprenis profundan studon de la ideoj de la germana filozofo kaj matematikisto Gottfried Wilhelm Leibniz kaj editoris kelkajn nepublikigitajn verkojn de tiu klerulo. En sia publikigaĵo Couturat pritraktis ankaŭ la proponojn de Leibniz por kreo de universala lingvo. Okaze de la Pariza Internacia Ekspozicio en 1900 kaj la 1-a Internacia Kongreso pri Filozofio en la franca ĉefurbo, Couturat levis la demandon pri uzo de internacia lingvo sen fari rekomendon favore al iu specifa lingvo. Giuseppe Peano, kiu ĉeestis tiun kongreson, esprimis simpation kun la celo de sia franca kolego kaj partoprenis en diskutoj pri la temo. Ne estas certe, ĉu en tiu jaro Peano jam estis aktiva planlingvisto.

Alia franca matematikisto, Charles Méray, referis pri Esperanto samjare ĉe la 2-a Internacia Kongreso de Matematikistoj, kaj lia prezentado okazigis diskuton pri la rezolucio proponita de amiko de Couturat, Léopold Leau, kiu invitis klerulajn organizaĵojn okupiĝi pri la demando de internacia lingvo. Charles Méray (1835-1911) tiutempe estis profesoro pri matematiko ĉe la Universitato de Dijono. Li eksciis pri Esperanto en 1900 kaj tuj fariĝis fervora — kaj sukcesa — propagandisto. Inter liaj varbitoj estis generalo Sebert, Carlo Bourlet kaj Émile Boirac. La tre entuziasma prof. Méray en 1901 donis al sia itala kolego Peano artikolon pri Esperanto, publikigitan en franca revuo pri kristana edukado[3].

Zamenhof menciis Peano plej verŝajne la unuan fojon en letero sendita al prof. Méray, kiu ankoraŭ ne estas publikigita en kolektoj de korespondaĵoj de la aŭtoro de Esperanto. Ĝi aperis kiel noto en itala matematika revuo en la jaro 1902.

> *D-ro Zamenhof, aŭtoro de la nova internacia lingvo Esperanto, la 30an de majo 1900 skribis al eminenta prof. Méray de la Universitato de Dijono: "La publikigo de kompleta matematika vortaro en Esperanto estos tre utila afero; kaj tial mi esperas, ke la nova verko povos fariĝi tiel perfekta, ke ĝi estos elektita por la menciita traduko, eĉ pli ĉar profesoro Peano estas tre kapabla esperantisto."* [4]

Zamenhof havis neniun faktan kialon nomi Peano esperantisto, do li faris tion probable nur surbaze de onidiro. Li ne renkontis la italan matematikiston pli frue ol 1906. Ne klara en la citaĵo estas la aludo pri kompleta matematika vortaro en Esperanto. Ĉu ĝi eble estis projekto de prof. Méray, kiu neniam estis publikigita? En postaj jaroj Peano kunlaboris kun Louis Couturat, kontrolante la italajn tradukojn de matematika vortaro en Ido kaj kvar etnolingvoj, kiun lia franca kolego kompilis [5].

Anstataŭ fariĝi adepto de Esperanto aŭ alia tiam ekzistanta planlingvo, Peano ellaboris sian propran projekton de simpligita latino. Tiu ideo venis de Leibniz, kiu proponis, ke la latina lingvo daŭre servu por faciligi internacian sciencan komunikadon post modifado, konsistanta el elimino de la gramatiko aŭ el ties redukto al



malmultaj raciaj rudimentoj. Peano debutigis sian projekton en la itala matematika revuo *Rivista di Matematica* en la jaro 1903. En la sekvaj jaroj li okupiĝis pli kaj pli pri la interlingvistiko kaj propagandis *Latino sine flexione* plej intense inter siaj propraj samfakuloj. Kelkaj el ili konvinkiĝis, ke tiu lingvo estas bona internacia lingvo, kaj ili komencis verki fakajn artikolojn en ĝi.

En 1908 Peano estis elektita direktoro de la *Akademi Internasional de Lingu Universal.* Tiu nomo estis donita al la malnova Akademio de Volapuko fare de adeptoj de *Idiom Neutral.* La *Akademi* akceptis la revuon de Peano,

Discussiones, kiel sian oficialan organon, kaj en 1909 alprenis ankaŭ lian lingvon. Ĝia nomo *Latino sine flexione* estis ŝanĝita en 1910 al *Interlingua,* kaj la akademio fariĝis *Academia pro Interlingua* [6]. Ĝia celo ne estis la evoluigo de iu internacia lingvo, nur diskutado kun plena toleremo pri planlingvaj problemoj fare de adeptoj de diversaj projektoj.

En oktobro 1907 Giuseppe Peano estis alelektita al la Komitato de la Delegacio por Akcepto de Helpa Internacia Lingvo, kiun organizis Louis Couturat. Kiam Peano ĉeestis la kunvenon en Parizo, li rimarkis, ke la delegitoj malfacile povos akordiĝi pri la elekto de unu el la proponitaj lingvoj. Li reiris al Torino antaŭ la fino de la sesio, do li ne partoprenis en la voĉdonado, kiu rezultigis la elekton de Ido.

Alia franca aktivulo sur la tereno de la planlingvistiko estis Alfred Michaux (1859-1937), advokato el Bulonjo-ĉe-maro, kiu lernis Esperanton en 1894 kaj organizis la unuan Universalan Kongreson de Esperanto en sia naskiĝurbo en 1905. Letero de Michaux, skribita en 1928, informas, ke Zamenhof decidis inviti aŭtorojn de aliaj planlingvaj projektoj al la dua Universala Kongreso okazonta en Ĝenevo en 1906. Du planlingvistoj akceptis tiun inviton: unu estis Bonto van Bijlevelt el Bruselo, adepto de *Idiom Neutral;* la dua estis Peano. Michaux aldonas: "Ni akceptis ilin kun plezuro. Multaj esperantistoj ne sciis pri tiu liberaleco de Zamenhof kaj kredis, ke estas apostateco interparoli kun konkurantoj!" [7]

En nekrologo pri prof. Peano, Alfred Michaux rakontas, ke kiam li prezentis la italan planlingviston al d-ro Zamenhof en Ĝenevo, tiu ĉi diris, ridetante: "Se miaj disĉiploj vidus min nun, ili ekskomunikus min." Kaj Peano respondis: "Mi havas malmultajn disĉiplojn, sed ili ĉiuj estas toleremaj; tio estas unu kompenso." [8].

Ŝajnas, ke tiu renkontiĝo ne havis sekvojn, ĉar nek Zamenhof nek Peano provis resti en kontakto unu kun la alia. Zamenhof, tamen, ne ĉesis informiĝi pri la laboro de Peano same kiel de aliaj proponantoj de internaciaj lingvoj. Kvankam li plurfoje mencias ilin en siaj verkoj, la nomo Peano aperas en nur du publikigitaj leteroj. En januaro 1911 generalo Sebert sendis al Zamenhof kopion de sia letero al Peano, en kiu li petis, ke lia nomo estu forstrekita el la listo de aprobantoj de la laboro de la *Akademia pro Interlingua.* La 8an de februaro Zamenhof dankis al Sebert pro la sciigoj pri la akademio kaj demandis, ĉu li resendu la kopion de la letero al Peano [9]. Zamenhof ankoraŭfoje skribis pri Peano al la generalo la 5an de marto 1912.

> *"Pri Ido kaj ankaŭ pri la laboroj de Peano kaj aliaj mi povas nur ripeti, kion mi jam kelkfoje diris: ni ne faru al ili reklamon per nia timo kaj ni iru trankvile nian vojon."* [10]

Kaj ĝuste tiel okazis. Ambaŭ, Zamenhof kaj Peano, iris la propran vojon, kaj Zamenhof ne plu havis okazon en siaj verkoj mencii Peano aŭ lian lingvon.

Kontraŭe, Peano ne povis ne rimarki la daŭran antaŭeniron de Esperanto. En 1914 Peano publikigis en Cavoretto (Torino) *Fundamento de Esperanto,* dekses-paĝan broŝuron en *Latino sine flexione,* prikomentantan la fundamenton de Esperanto. Tiu ĉi publikigaĵo estas unikaĵo, unu el la tre maloftaj verkitaj en unu planlingvo por klarigi alian projekton. La nomo de Peano troviĝas inter la kunlaborantoj de la reformema revuo *Esperanta Evoluo,* redaktita de H. Sentis en la jaroj 1911-1914. Post la unua mondmilito, la Itala Societo por la Progreso de Scienco nomumis Peano al trikapa komitato por esplori la utilon de Esperanto. Peano ankaŭ verkis la antaŭparolon de la Esperanto-itala vortaro de Giacomo Meazzini, *Novo Vocabolario Esperanto-Italiano,* eldonita en S. Vito al Tagliamento en 1922.

Latino sine flexione (aŭ *Interlingua*) komencis stagni kaj regresi en la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj. Post la dua mondmilito oni ne plu aŭdis pri agado de adeptoj. Antaŭ ol Peano mortis en 1932, li sendube konstatis, ke lia lingvo havas neniun ŝancon esti akceptita kiel la internacia lingvo.

Bernard Golden (Hungario)

Bernard Golden, usonano nun loĝanta en Hungario, fariĝis sendube la plej produktema esperantologo de la Movado. Liaj eseoj — iom diversaj laŭ kvalito — troviĝas en preskaŭ ĉiu movada revuo.

Notoj

1. **Golden,** Bernard. Bibliografiaj donitaĵoj pri eblaj planlingvaj fontoj de Esperanto, p.279-299 en **Szerdahelyi,** István (red.), *Miscellanea Interlinguistica.* Budapest: Tankönyvkiadó, 1980.
2. **Kennedy,** Hubert C. *Peano. Life and works of Giuseppe Peano.* Dordrecht, Boston, London: D. Reidel Publishing Company, 1980.
3. Vd. noton 2, p.127. L'Esperanto, langue auxiliaire internationale. *L'Enseignement Chrétien,* 1901 majo 1.
4. **Ceretti,** U. Noto. *Periodico di Matematica,* 1902; 17: 274.
5. **Couturat,** Louis. *Internaciona Matematikal Lexiko.* Jena: Fischer, 1910.
6. **Carlevaro,** Tazio. Mondlingvaj akademioj, p.381-391 en **Haupenthal,** Reinhard (red.), *Li kaj Ni. Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien.* Antverpeno, La Laguna (Hispanio): TK Stafeto, 1985. Vd. p.384-385.
7. Collectione de scripto in honore de prof. G. Peano in occasione de suo 70° anno. Supplemento ad *Schola et Vita.* Milano, 1928 aŭgusto. Vd. "Vivat Peano" de Adv. A. **Michaux,** p.51.
8. Necrologios de prof. Peano. *Schola et Vita,* 1932; 7: 210-211.
9. **Zamenhof,** L.L. en **Waringhien,** Gaston (red.), *Leteroj de L.L. Zamenhof. Vol. 2.* Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1948. Vd. p.283-284.
10. Vd. noton 9, p.302.

Zamenhof kaj Eliezer Ben Yehuda:

la kaŭzoj de iliaj (relativaj) sukcesoj kiel lingvovivigintoj

Multajn, precipe lingvistojn, mirigas la fakto ke Zamenhof, kiu tute ne estis profesia lingvisto, kreis la ĝis nun plej sukcesan planlingvon, dum ekzemple Jespersen, la plej granda lingvisto el ĉiuj planlingvokonstruintoj, kreis planlingvon Novial, kiu tute malaperis. Apriore ŝajnas akceptebla, ke kapablo kiel lingvisto, kaj nenio alia, estas necesa por sukcesi kiel planlingvokonstruanto. Sed la faktoj refutas tiun tezon. Multaj lingvistoj ŝajnas trovi ofendo por sia fakhonoro, ke alia ol lingvisto estus kompetenta por elpensi kaj enkonduki planlingvon.

La fakton povas klarigi la komparo kun entrepreno, kiu apriore povis ŝajni same senespera kiel la enkonduko de lingvo tute nova: la revivigo de klasika lingvo, kvankam kun certa tradicio de aktiva uzado. Sed tiu entrepreno sukcesis en unu kazo: la hebrea lingvo en la moderna Israelo. La reviviginto de la hebrea lingvo estis Eliezer Ben Yehuda (1858-1922). Kaj mi kredas, ke en la tuta kulturhistorio de la homaro li estis la persono plej simila al Zamenhof en sia konduto.

Same kiel Zamenhof Ben Yehuda ne estis profesia lingvisto. Zamenhof estis profesie kuracisto. Ben Yehuda studis kelkajn jarojn en la Sorbono lingvojn kaj historion de la Meza Oriento, sed neniam akiris akademian gradon.

Certan rolon en ilia sukceso kiel lingvovivigintoj ludis ilia kapablo kiel stilistoj. Zamenhof verkis kortuŝajn originalajn Esperantajn poemojn kaj ĝue legeblajn tradukojn de literaturaj klasikaĵoj. Ben Yehuda estis bonstila ĵurnalisto. Sed de ambaŭ la stilaj kapabloj ne estis esceptaj, nek kompare kun iliaj sekvantoj, nek kompare kun aliaj planlingvokonstruintoj. Tamen por komparo, ekzemple Couturat kaj Jespersen tute ne estis artistoj sed bonaj sciencaj stilistoj.

Ben Yehuda plenumis sep paŝojn en la revivigado de la hebrea lingvo: **1)** la unuan hebrelingvan familion; **2)** la alvokon al la Diasporo kaj la loka loĝantaro; **3)** la hebrelingvajn asociojn; **4)** la hebrean lingvon per la hebrea lingvo en la lernejo; **5)** la ĵurnalon; **6)** la vortaron de la hebrea lingvo, antikva kaj moderna; **7)** la lingvan konsilantaron (Fellman, p.36). Malmultaj el ĉi tiuj paŝoj trovas iun ekvivalenton en la vivo de Zamenhof kaj la Esperantomovado ĝenerale. Ekzemple, publikigante planlingvon Zamenhof devis doni al ĝi vortaron, sed ĝi estis rimarkinde konciza. La plej kompletan vortaron de Esperanto (*Vortaro de Esperanto,* 1910) jam dum lia vivo verkis ne Zamenhof, sed Kabe.

Zamenhof dum sia tuta vivo ellaboradis la Esperantan literaturon. Tiu flanko de lia aktiveco tute mankis al Ben Yehuda. Sed tiun diferencon kaŭzis parte la malsameco de la stato en kiu ili trovis "siajn" lingvojn aŭ kio dum la komenco de ilia aktivado ŝajnis atendinda. Ambaŭ tutkore dediĉis sin al la enkondukado de siaj lingvoj en ĉiujn vivosferojn, kaj koncentriĝis ĝuste pri tiuj vivosferoj, en kiuj la uzado de iliaj lingvoj ŝajnis apriore malplej verŝajna. De la hebrea lingvo la literatura uzado neniam tute ĉesis, kvankam ĝi malpliiĝis dum la 19a jarcento, tial ĝian reflorigadon Ben Yehuda povis lasi al aliaj. Sed oni povis serioze dubi, ĉu lingvo havanta siajn radikojn en pasinteco antaŭ 1800 jaroj estas ankoraŭ taŭga aŭ adaptebla por la ĉiutaga moderna vivo. Tial Ben Yehuda metis al si la taskon en ĝi trakti ĝuste la aktualaĵojn en ĵurnalo. Por la planlingvoj aliflanke, bazitaj sur la modernaj Eŭropaj lingvoj, komence la moderaj adeptoj kaj moderaj kontraŭuloj volonte konsentis, ke ili estas taŭgaj por la pli intelektaj vivosferoj, kiel scienco, tekniko, politiko, komerco, sed — ĉar ili estas nenies aŭ preskaŭ nenies gepatraj lingvoj kaj, tiel oni supozas, fruktoj de la nura intelekto kaj psikologie fremdaj al ĉiuj — maltaŭgas por la literaturo. Ankoraŭ en 1928, post la debuto de Kalocsay, Jespersen skribis en *An International Language* (p.27): "La helplingvo devas kompreneble ĉiam esti lingvo intelekta, lingvo por la cerbo, ne por la koro... En ĝi ĉiam estos io seka kaj proza, kaj estas misprovo traduki en helplingvon tre profundan lirikon; oni devos kontentigi sin per tio traduki la enhavon de la poemoj, do io, kio korespondus al transformo de la poemoj en prozon de iliaj naciaj lingvoj".

D-ro Zamenhof en la "vartĉambro" de Esperanto



Aliloke en *An International Language* (p.138) Jespersen skribas: "Estas vere ke Novial estas ne tiel riĉa kiel la angla lingvo, ne tiel eleganta kiel la franca, ne tiel forta kiel la germana, ne tiel bela kiel la itala, ne tiel nuanca kiel la rusa, ne tiel hejma kiel nia gepatra lingvo. Sed rimarku bone, ke ĉiuj tiuj bonaj kvalitoj, kiujn oni laŭdas en la naciaj lingvoj, troviĝas nur kiam ilin parolas aŭ skribas indiĝenoj. Kaj la interlingvo povas tre facile esti pli riĉa ol la angla lingvo parolata de franco, pli eleganta ol la franca lingvo parolata de dano, pli forta ol la germana lingvo de kelkaj italoj, pli bela ol la itala lingvo de la angloj, pli nuanca ol la rusa lingvo de germanoj, kaj pli hejma ol mia lingvo parolata de la rusoj. Kaj ĉar Novial estas helplingvo, la komparo estas justa nur kun la naturaj lingvoj kiel ilin ordinare parolas alilandanoj, kaj tiam nek Ido nek Novial bezonas honti." Eĉ tiu juĝo pri Novial estas tro favora: la anglalingvaj sciencaj publikigaĵoj de Jespersen estas multe pli viglaj kaj bonstilaj ol liaj publikigaĵoj Novialaj.

Tio montras, ke mankis al Jespersen ne stila talento, sed psika identiĝo kun la lingvo, kiun Zamenhof kaj Ben Yehuda havis altgrade. Ben Yehuda skribis: "Kelkfoje mi sentis, kvazaŭ la hebrea estus mia gepatra lingvo, ĝi venis tiel libere kaj facile paroleble." (Ben Avi, p.17). Kaj Zamenhof skribis en sia letero al Borovko (p.23): "Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo."

Tiuj du faktoroj, la psika identiĝo de la aŭtoro kun la lingvo kaj la serioza laborado por ĝia enkondukado en ĉiujn vivosferojn, mankis tute en preskaŭ ĉiuj aliaj planlingvomovadoj. Plej ekstrema ĉi-rilate estis denove Novial, kies adeptoj faris preskaŭ nenion alian ol diskuti pri reformproponoj. Iom malpli ekstremaj estis Ido kaj Occidental, en kiuj aperis almenaŭ kelkaj literaturaĵoj. Tamen ankaŭ en ili tro dominis la teoriado pri la lingvo, anstataŭ la praktikado de la lingvo. En Occidental la kulturaĵoj estis tiel malaltvaloraj, ke Ric Berger, kiam en 1956 — post pli ol dudek jaroj da Occidentalisteco — li transiris al Interlingua, skribis: "Materiale tiu solvo (nome kompromiso inter Interlingue kaj Interlingua) ne estus avantaĝo, ĉar ĉiuj *lernolibroj* en la du tendaroj senvaloriĝus." (p.1) kaj "Perdo de laboro, eldonaĵoj, tempo kaj mono estas evidente la unua rezulto de la forlaso, forturniĝo, rezigno de unu lingvo por alia." (p.4). La sola planlingvomovado krom la Esperanta, kiu kontentige atentas la praktikadon de la lingvo, estas tiu de Interlingua, kaj ĝuste ĝi post 1960 iĝis nia plej serioza rivalo.

Frapanta simileco inter Zamenhof kaj Ben Yehuda estis ankaŭ la juna aĝo, en kiu ili komencis la vivigon de siaj lingvoj. Ben Yehuda estis familiara kun la hebrea lingvo ekde sia infanaĝo. En 1879 (je la aĝo de 21) li publikigis la artikolon "Serioza demando", konsidereblan kiel la komencon de la reviviĝo de la hebrea lingvo kaj li fondis sian hebrelingvan familion en Palestino en 1881 (je la aĝo de 23 jaroj). El ĉiuj grandaj planlingvokonstruintoj Zamenhof estis la plej juna. Schleyer estis 47-jara kiam li publikigis Volapük, Peano estis 45-jara kiam li publikigis Latino sine flexione, Couturat estis 40-jara kiam li publikigis Idon, De Wahl estis 55-jara publikigante Occidental, Jespersen estis 68-jara publikigante Novial, Gode estis 44-jara publikigante Interlingua; sed Zamenhof okupiĝis pri la universala lingvo ekde sia infanaĝo, verkadis artefaritan lingvon en sia gimnazia tempo kaj publikigis Esperanton je la aĝo de 27 jaroj. Tiu juna aĝo havis la avantaĝon, tiel ĉe Ben Yehuda kiel ĉe Zamenhof, permesi kompletan psikan identiĝon kun sia lingvo. Ĉar ju pli juna oni lernas lingvon, des pli komplete oni povas identiĝi kun ĝi. Tio validas ankaŭ por lingvo kiun oni mem kreis. Kiel atestas liaj propraj eldiroj, Novial restis psike fremda eĉ por sia aŭtoro.

Kion pruvas la komparo de la Esperanto-movado kun la reviviĝo de la hebrea lingvo? Nur, ke la enkonduko de planlingvo kiel mondolingvo ne estas neebla pro la ĝeneralaj sociologiaj leĝoj de la lingvo. "Eĉ artefarita lingvo neniam vivinta, kiel Esperanto aŭ Interlingua, povas esti vivigita, se nur ekzistas agnoskata bezono de ĝi kaj obstina volo de homoj ĝin viviĝi." (Naftali Tur-Sinai, p.9).

Sed ĝi pruvas ne, ke Esperanto iam estos enkondukita kiel mondolingvo. Koncerne la reviviĝon de mortintaj (aŭ preskaŭ mortintaj) lingvoj instrua estas la komparo kun la klopodo revivigi la irlandan lingvon post la praktika sendependiĝo de Irlando en 1921. Ekde la 17a jarcento la angla lingvo estas la gepatra lingvo de la grandega plimulto de la irlandanoj; nur malgranda parto de la loĝantaro parolas la irlandan kiel gepatran lingvon. Ekde 1921 oni klopodis fari la irlandan lingvon denove la nacie lingvo instruan-

te ĝin en ĉiuj lernejoj. Tio ne sukcesis: la grandega plimulto de la irlandanoj parolas la anglan kiel gepatran lingvon kaj ne estas preta interŝanĝi ĝin kiel normalan komunikilon por la irlanda. La reviviĝo de la hebrea lingvo povis sukcesi parte, ĉar la judaj enmigrintoj en Palestinon ĉ. 1880 estis tre diverslingvaj: el ĉiaj landoj ili kunportis siajn lingvojn.

El tio oni povas konkludi, ke enkonduki novan lingvon (aŭ revivigi malnovan lingvon) oni povas nur en komunumon urĝe bezonantan sed ne jam havantan komunan lingvon. Por la estonteco de la planlingvoj tio signifas, ke planlingvo havas ŝancon en internacia komunumo, se urĝe estas bezonata komuna internacia lingvo kaj ekzistas certa potencekvilibro inter la grandaj naciaj lingvoj (ankaŭ la hebrea lingvo havis rivalojn en Palestino en la periodo de 1879 ĝis la unua mondmilito!). Male, se je la momento kiam internacia lingvo estos bezonata, unu nacia lingvo, ekz. la angla, jam havos mondvastan hegemonion, tiam ĉiuj planlingvoj estos senŝancaj.

W.A Verloren van Themaat (Nederlando)

Literaturo

Ben-Avi, I. (1941) *Kol Kitve Eliezer Ben Yehuda,* Jerusalemo.
Ben-Yehuda, E. (1879) *Serioza demando,* Ha-Shaber 7, p.3-13.
Berger, R. (1957) Li nov situation de Interlingue (La nova situacio de Interlingue). *Le Currero del mundo* 3/1, suplemento, p.1-4.
Fellman, J. (1973) *The Revival of a Classical Tongue: Eliezer Ben Yehuda and the Modern Hebrew Language* (La reviviĝo de klasika lingvo: Eliezer Ben Yehuda kaj la moderna hebrea lingvo), Hago-Parizo: Mouton, 171p.
Jespersen, O. (1928) *An International Language* (Internacia lingvo), Londono: George Allen & Unwin Ltd, 196p.
Maimon, N.Z. (1978) *La kaŝita vivo de Zamenhof. Originalaj studoj kun enkonduko de G. Waringhien,* Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 214p.
Tur-Sinai, N.H. (1960) *The Revival of the Hebrew Language* (La reviviĝo de la hebrea lingvo), Jerusalemo.
Zamenhof, L.L. (1895) *La deveno de Esperanto,* Esperanto Association of North America, 24p.

(Iom malsama versio de ĉi tiu artikolo aperis en la unua numero de la nederlanda gazeto La fenomeno, *feb. 1987.)*

Belartaj Konkursoj de UEA 1988

Jam de 1950 la Belartaj Konkursoj faras sian kontribuon al la kuraĝigo kaj instigo de niaj propraj kulturaj kreantoj. Nun denove UEA alvokas al partopreno, substrekante la altajn kriteriojn, kiuj devas validi por ĉiu branĉo, kaj la gravecon de bona rego de Esperanto por la konkursantoj en la literaturaj branĉoj. **Aparte notu,** ke la reguloj por la branĉoj Teatraĵo kaj Fotografio estas iom ŝanĝitaj.

Konkursaj detaloj: Rajtas konkursi ĉiu esperantito, kiu ne gajnis dum la tri antaŭaj jaroj la unuan premion en la branĉo, por kiu ŝi aŭ li konkursas. Unu persono povas partopreni per maksimume tri verkoj en ĉiu literatura branĉo.

Poezio: Sen fiksita maksimuma longo de konkursaĵo. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo de konkursaĵo 200 × 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Sen maksimuma ludodaŭro. Tri premioj.

Eseo: Temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la Internacia Lingvo. Longo ĉ. 400 × 65 tajpospacoj. Unu premio (Premio Luigi Minnaja).

Fotografio: Temo ligiĝu kun la lingvo Esperanto aŭ kun la kongresa temo en tiu jaro (ĉi-jare: "Scienco kaj tekniko — por internacia kompreniĝo"). Minimuma formato 13 × 18cm. Nigra-blankaj aŭ koloraj. Tri premioj.

Kanto: Teksto kaj melodio, kiuj povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj, estu novaj kaj nepublikigitaj. Unu premio (Premio An-okin).

Infanlibro de la Jaro: Eldonejoj rajtas proponi infanlibrojn, originalajn aŭ tradukitajn, kiuj aperis en la jaro 1987. Unu premio.

Reguloj: La konkursaĵoj por la branĉoj poezio, prozo, teatraĵoj, eseo kaj kanto (t.e. teksto kaj muziknotoj) devas esti senditaj en kvar ekzempleroj al la adreso de la sekretario de la Konkursoj: **Osmo Buller, Puomitie 2 as 14, SF-87250 Kajaani, Finnlando,** kaj devas atingi lin plej malfrue la 31an de marto 1988. En la branĉo Fotografio sufiĉas sendi unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, tiel ke la sendaĵo atingu nin antaŭ la 1-a de julio

La konkursaĵoj devas porti klaran indikon pri la konkursa branĉo kaj (escepte de la infanlibroj) esti signitaj per pseŭdonimo; en aparta koverto estu indiko de tiu pseŭdonimo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto. Se tion permesas la poŝtaj reguloj de la koncerna lando, oni aldonu po 5 ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas.

Nevalidaj por la Konkursoj estas verkoj aperintaj en presa formo. Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri la unua presigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la presigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed tiu konsentas cedi ĝin senpage okaze de eldono de antologio de la Belartaj Konkursoj, kondiĉe ke tiu aperu kun la aprobo de UEA.

La gajnintoj normale legas aŭ legigas la premiitajn verkojn en aparta kongresa aranĝo; teatraĵoj povas esti luditaj aŭ legitaj, la kanto prefere prezentita de kantisto aŭ ĥoro. Oni okazigas ekspozicion de la premiitaj fotoj. Ĉiu premiito ricevas diplomon.

Premioj: Unua premio 280 gld.; dua premio 196 gld.; tria premio 112 gld. Premio Luigi Minnaja ĉ. 300 gld. Premio An-okin 280 gld. Premio Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam antaŭe premiita) 196 gld. plus enskribo sur la pokalon Henry Harabaĝiu. Premio por Infanlibro de la Jaro 588 gld.

Malnova pano en nova pakumo

Kritikaj studoj defende de Esperanto, Ivo Lapenna (1909). Kopenhago: Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, 1987. 60p. 30cm. ISBN 87-982430-1-2. Prezo: 22,80 gld.

Forblovinte la polvon de sur kvar antaŭe publikigitaj periodaĵ-artikoloj, Ivo Lapenna represigis ilin libroforme, unue por fari ilin malpli efemeraj, kaj due por prezenti ilin kiel kontribuaĵon al la Jubilea Jaro. Kun minimuma redaktado kaj ĝisdatigo, la artikoloj aperas sur grandformataj paĝoj el luksa glacea papero. Post la tekstoj sekvas unupaĝa persona indekso, sed mankas loka kaj tema indeksoj.

La titolo *Kritikaj studoj defende de Esperanto* ne estas tute ĝusta, ĉar la kvar verkoj ne estas veraj studoj kiel tiuj de kleruloj en la sciencaj kaj literaturaj branĉoj, t.e. zorgaj, profundaj ekzamenoj kaj analizoj de kulturhistoriaj aŭ sciencaj fenomenoj kaj problemoj. Male, Lapenna mem konfesas en la "Antaŭparolo", ke tiuj ĉi artikoloj havas polemikan karakteron. Cetere, ili ne celas tiom defendi Esperanton kiom defendi la aŭtoron, kiu skribas, ke "...la defendo grandparte rilatas al mi persone". Evidentas, do, ke tiu ĉi publikigaĵo estas ankoraŭ unu provo konvinki la verdan mondon pri la bonaj faroj de Lapenna en la Esperanto-movado. Ne ĉiuj legintoj de *Kritikaj studoj* samopinios kun li, ke la kvar tekstoj estas "...speciale gravaj el historia kaj aktuala vidpunktoj en la Jubilea Jaro". Mi mem emas rebapti ilin *Kaŭstikaj polemikoj defende de Ivo Lapenna.*

La adresato de "Nefermita letero al J.V. Stalin" antaŭ longe forpasis en la transtomban mondon, kaj poste la sinteno al Esperanto fariĝis multe pli favora en Sovetunio kaj ankaŭ en aliaj socialismaj landoj. Se tiu situacio ankoraŭ ne kontentigas Lapenna, li ne uzu la flaviĝintan leteron al Stalin por protesti sed verku tute novan, aktualan dokumenton.

"Kelkaj lingvistikaj demandoj" aperis la unuan fojon antaŭ pli ol kvaronjarcento. Ne estas kompreneble, kial remaĉado de la polemiko pri lingvaj demandoj kontraŭ d-ro William Solzbacher el Usono ankoraŭ estas aktuala. La bibliografiaj referencoj mem estas elmodiĝintaj; la plej freŝdata estas de la jaro 1957! Se Lapenna opiniis, ke valoras hodiaŭ ripeti tiujn argumentojn, li estus devinta reverki la tutan artikolon por povi apogi sin sur donitaĵoj kaj statistikoj ĉerpitaj el nuntempaj lingvistikaj fakverkoj.

En la sekvaj du artikoloj, la senĉesa martelado de bombastaj kritikoj efikas cerbskue. Ankoraŭfoje Lapenna reliefigas siajn kvazaŭ-aŭtoritatajn starpunktojn koncerne la organizadon kaj funkcion de la Esperanto-movado kaj la manieron prezenti Esperanton al la ekstera mondo.

En sia prikomentado de la libro *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-Movado,* redaktita de d-ro Detlev Blanke el GDR, Lapenna riproĉas al Blanke ties ideologian pozicion rilate Esperanton. Povra Lapenna ne povas, aŭ ne volas, kompreni, ke Esperantaj agadoj en kelkaj provincoj de Esperantujo povas okazi nur en la kadro de tiu ideologio, kiun li antipatias. Naiva retorikaĵo estas la invito farita de Lapenna al Blanke kaj aliaj "ideologoj" partopreni diskuton kaj defendi siajn starpunktojn. Ĉi-flanke de paradizo estas nek loko nek okazo por pinto-kunveno inter la Ideologo de la Okcidento kaj la Ideologo de la Oriento.

En la kvara artikolo, Lapenna provas montri al d-ro Peter G. Forster el Anglio, ke tiu ĉi faris similan eraron kiel Blanke, ĉar li provis priskribi kaj interpreti la historion kaj sociologion de la Esperanto-komunumo sendepende de la instruo de Lapenna. Lapenna ne nur draste draŝas la anglalingvan libron de Forster, *The Esperanto Movement* (La Esperanto-movado), sed eĉ retrospektive minacas la aŭtoron, informante lin, ke la doktoriĝa disertacio, sur kiu baziĝas la libro, neniam estus akceptita, se Lapenna estus estinta la gvidanto kaj kontrolanto de la studento ĉe la Universitato de Londono. (Kiom ofte orgojlaj kaj arogantaj profesoroj en universitatoj tra la tuta mondo malhelpas la doktoriĝon de studentoj, ĝuste ĉar tiuj ĉi rifuzas sklavece submetiĝi kaj inkludi en sia tezo la nociojn kaj vidpunktojn de la profesoro!) Bonŝance Forster preparis sian disertacion ĉe la Universitato de Hull.

La stilo de *Kritikaj Studoj* estas ĝenerale peza, kaj plurfoje la enhavo tedas pro la gurdita litanio da temoj kaj esprimoj. Estas bedaŭrinde, ke kompetenta redaktoro ne forigis la malglataĵojn antaŭ represado. Menciindaj ankaŭ estas mankoj kaj misaĵoj en la lingvouzo, kiuj obstaklas facilan kaj plenan komprenon de partoj de la tekstoj.

Lapenna faris gravan mispaŝon, surtabligante tiujn kvar tranĉaĵojn de malfreŝa pano. Por vera jubilejara festeno, li estus devinta prepari multe pli nutran kaj frandeman regalon. Jen kelkaj sugestoj.

1. **Aŭtobiografio.** Se ĝi estus provizita per abundaj notoj kaj detalaj indeksoj, ĝi servus kiel valora konsultlibro por movadhistoriistoj.
2. **Bibliografio.** Kompleta kaj ĝisdata listigo de ĉiuj verkoj en Esperanto kaj en etnolingvoj pri Esperanto, juro kaj aliaj temoj fariĝus kolosa kompilaĵo, ĉar laŭ la aserto de Lapenna mem, el lia plumo venis "kelkaj miloj" da verkoj.
3. **Festlibro.** Per siaj kontribuaĵoj, kolegoj kaj amikoj de Lapenna povus samtempe honori lin kaj la Jubilean Jaron.

Ankoraŭ ne estas tro malfrue aperigi unu aŭ pli el tiuj atutaj verkoj. Ek al la laboro!

Bernard Golden (Hungario)

Noto de la redaktoro: Ĉar oni foje emas trakti ĉiujn opini-esprimojn en Esperanto *kvazaŭ ili estus oficiala politiko de UEA, mi volas aparte emfazi la fakton ke subskribita artikolo reprezentas la opiniojn nur de la aŭtoro. Mi opinias, ke plej bone servas la Movadon malferma kaj demokratia informa politiko, i.a. koncerne la ĉi-paĝan temon — kiel jam atestis la jubilejaraj numeroj.*

Reagoj

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Tamen altas nia poezio

En la artikolo en *Sezonoj* de aŭtuno 1986, citita en *Esperanto* 1987/p.111, frapas, ke Birjulin koncerne la Esperantan literaturon pritraktas nur la prozon, dum la literaturaj rondoj en Esperanto traktas ĝian poezion multe pli alte. Borges estis eble Nobelpremiinda, kvankam li neniam ĝin ricevis. Estus troigo proponi Auld por la Nobelpremio por literaturo, sed eble la kulminuloj de la Esperanta poezio estas kompareblaj kun nacie famaj poetoj.

W.A. Verloren van Themaat (Nederlando)

Angla propagando?

Neniam mi imagis, ke la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio troviĝus en tia mizera stato de manko de proponitaj manuskriptoj, ke ties redaktoro akceptus artikolon kun ripetita konsilo: lernu la anglan lingvon. Fi! Eĉ rilate al subskribita artikolo! (*Esperanto* 1987/p.89).

Lorenc' Mi (Britio)

Ni emfazu realan komunikadon

Fraŭsin (*Esperanto* 1987/p.68) prave asertas, ke multkaze la instruado de la angla efektive sukcesas, kaj el tio lernantoj tiras realan utilon. El kio fontas tiu sukceso? Finfine, la angla estas gramatike labirinta, ortografie koŝmara, idiotisme perversa kaj prononce harelŝiriga. Unualoke gravas la motivigo, sed dualoke la uzataj instru-teknikoj. Helpate de senfinaj rimedoj kaj la sprono de abunda financa pergajno, legioj da pedagogoj evoluigadas metodojn kaj alirojn, kiuj minimumigas la influon de la malfacilaĵoj kaj maksimumigas la kapablon praktike uzi la lingvon en realaj situacioj... Ĉe Esperanto, sen kontinue kunvivanta parolkomunumo, la neceso perfektigi aŭskult-komprenreag-parol-kapablon estas eĉ pli urĝa ol ĉe etnaj lingvoj. Nia instruado centriĝu ĉirkaŭ la bezonoj de ĉiuj utilaj komunik-postulaj situacioj.

Stefan MacGill (Hungario)

Paciencu sed ne rezignu

Kian rolon s-ro Dumain (*Esperanto* 1987/p.92) aljuĝos al Esperanto en vero, se nacia interlingvo regos super la tuta mondo? Li diru tion konkrete! Li skribas, ke "ekster scienco, teknologio kaj komerco la angla lingvo ne tenas monopolon". Ĉu tio ne jam estas regpotenco granda, por facile finfine regi super ĉiuj kampoj? Do, kian roleton li havus tiam ankaŭ por Esperanto? Tuj nunmomente al Esperanto ne estas eble anstataŭi la anglan kiel interlingvo, ĉar ĝi jam havas grandan antaŭavantaĝon kaj ĉar por tio internacia konvencio estas necesa... Kaj ke tiu nomita konvencio ne facile kaj tuj estas akirebla ankaŭ scias ĉiu sobra esperantisto.

Gottfried Hofstätter (Aŭstrio)

Zairio enfokusiĝu

Post laŭlanda dokumentado pri la Tria Mondo, mi asertas plej taŭgan agadterenon Zairio, kiu havas ĉ. 23 oficialajn lingvojn kaj gravajn edukajn malhelpaĵojn (laŭ zairiaj ministraj gazetoj mem!)... kaj duarange la landojn apud Zairio. Se eksukcesos Esperanto en tiu regiono (naciskale aŭ internacie, en komerco aŭ administro), ĝi certe disradios sur la tuta kontinento kaj eksteren. Ĉiu esperantisto sentu sin iom zairiano, multaj venu agadi tie, kaj nepros la rezulto, kiun ni nur revas nune.

Alexandre Rousset (Francio)

Estrara anarkio?

Gratulon pro la realismaj komentoj pri la tradukreto de C. Bodson. Gravega peko en nia movado estas ja disa, entuziasma, senplana laboro. Sekve ni ofte senfruktodone eluzas niajn magrajn fortojn kaj rimedojn por nerealigeblaj celoj. Ĉu pri tia anarkia situacio ne parte kulpas la UEA-estraro kiu — laŭdire — tro ofte okupiĝas pri sekundaraj, detalaj problemoj? Laŭ mi, ĝia ĉeftasko estu roli kiel "iniciat- kaj kunordigant-stabo".

Germain Pirlot (Belgio)

Spite la spriton...

Kun ĝuo mi legis la artikolon "Distraj horoj en la kancerklinika atendejo" (*Esperanto* 1987/p.104). Tamen min mirigis legi, ke mi kunlaboras en la redakcio de *Brita Esperantisto,* ĉar mi tute ne sciis tion! Mi eĉ ne abonas tiun valoran gazeton! Do gratulojn pro la bona, sprita artikolo de Ĵak Le Puil, sed bonvolu forstreki min el tiu redakcio.

Rejna de Jong (Nederlando)

Solviĝas supersignoj

Por relanĉi la debaton, ĉu Esperanto estas latinida lingvo, jen nova argumento nevole alportita de SAGEM, fame konata franca fabrikanto de teletajpiloj kaj teleksmaŝinoj. En reklamfolio pri teksto-prilaborilo TCE 2000, SAGEM interalie mencias, ke ĝi "disponas pri plej ampleksa, legebla sur ekrano kaj presebla litertiparo (la 309 literoj de la latinidaj lingvoj)". Ĉar tiu maŝino ebligas ankaŭ tajpadon de la Esperantaj supersignitaj literoj, ĉu eblas konkludi, ke Esperanto estas latinida lingvo?

Pli serioze, temas pri grava kaj bona novaĵo, laŭ kiu la internacia normo "teleteks" eksolvis la problemon de la multnombraj diakritaj signoj por la latina alfabeto.

Dominigue Cornice (Francio; teletekso 933-145005932 = ibos)

Estas nova normo de la Internacia Normiga Organizaĵo (ISO) pri ordigo de komputilaj klavaroj. La kopio de la ISO-klavaro kiun mi havas ne estas perfekte legebla, sed bone videblas "mortaj" klavoj por la Esperanto-supersignoj. En Belgio cetere ekfunkciis "Teletex" (jam vaste uzata en Germanio). Oni ne povis certigi al mi, ke la du karaktraroj identas, sed certe ambaŭ multe similas. Mi konkludas, ke (ne nur) esperantisto kiu bezonas komputilon nepre postulu, ke la aparato estu kongrua kun la ISO- kaj Teleteks-normoj.

Roland Rotsaert (Belgio)

Laste aperis...

Adiaŭ, Kuzko!, Oldřich Knichal. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 88p. 20 cm. ISBN 963-571-173-5. Romano pri la aventura vivo de argentinano, spegulanta la socion de Sud-Ameriko. Prezo: 12,00 gld.

Adolesko, Blazio Vaha (Balázs Wacha). Budapest: Oy Mendoservo Ak (Finnlando) kaj Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 284p. 20 cm. ISBN 963-571-172-7. Originala romano aŭtobiografieca, psikologiema. Prezo: 18,00 gld.

Antaŭ la nova jarmilo. Ideoj por la vivo el mondo minacata, div. aŭtoroj, red. Wolfgang Günther. Paderborn: Germana Esperanto-Asocio, 1987. 534p. 30cm. ISBN 3-922570-46-1. Giganta, iom ĥaosa kolekto de eseoj k.a., plejparte originalaj. Prezo: 52,80 gld.

Beletraj eseoj, Georgi Miĥalkov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1987. 114p. 20cm. Dek eseoj pri la originala Esperanta literaturo. Prezo: 4,80 gld.

Ĉaka milito, La, div. aŭtoroj. El la germana trad. Victor P. Epp. Westmount: la tradukinto, 1987. 32p. 21cm. Personaj spertoj el milito inter Bolivio kaj Paragvajo, 1932-1935. Prezo: 3,00 gld.

Dictionarium museologicum, ĉefred. István Éri kaj Béla Végh. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 55 + 774p. 24cm. Bind. ISBN 963-571-174-3. Imponega 20-lingva terminaro por 1632 muzeologiaj nocioj; kun aparta indekso por ĉiu lingvo. La Esperantan sekcion redaktis B. Golden kaj T. Sekelj. Prezo: 150,00 gld.

Dum nokta deĵoro, Nevena Nedelĉeva. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 85p. 20cm. ISBN 963-571-180-8. Simplaj realismaj rakontoj. Prezo: 12,00 gld.

Eldonoj trilingvaj, 1-a kaj 2-a kajeroj, komp. kaj trad. Ergoto de Bonaero (Adamo Rinkievo). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1984. 24p. 22 × 33cm. Bind. Poemoj en diversaj lingvoj, ĉefe paralele en la angla, la hispana kaj Esperanto. Prezo: 15,00 gld.

Esperanto. Il perché di una scelta, Amerigo Iannacone. Ceppagna: Kajeroj de "La Flugfolio", 1986. 19p. 24cm. Varba libreto. Prezo: 4,80 gld.

